

AVENO #45 - Homaj Rajtoj - 2019

Ghenerala rimarko: pluraj informoj alvenas kun peticio - kompreneble plej multaj el ili ne plu estas aktivaj. Do, bonvolu kontroli la daton, se vi intencas subskribi ian ajn peticion.

Se vi serchas ion chi-sube: kutime mi uzas la literumadon pere de „h“: ch, ... sh + u. Ligoj:

AVE: <http://www.verduloj.org> , novaj artikoloj je la enirpagho, aliaj sub "Dokumentoj

Lingvaj Rajtoj = Homaj Rajtoj: www.linguistic-rights.org/

Tutmondaj Mondcivitanaj Teritorioj: <http://www.recim.org/dem/tcm-list.htm>

Rajto de memdetermino: eo.wikipedia.org/wiki/Rajto_de_memdetermino

= = =

2019-11-01 Chinio re-arbarigas siajn dezertojn

En giganta programo okazis rearbarigo de la randoj de la dezertoj en la nordo kaj ankau en la leusa montetaro de centra Chinio. Sukcesoj videblas, ekz-e ke en Pekino ne plu estas sablo-shtormoj.

En grandaj areoj – antaue sablaj - nun kreskas arboj kaj eblas rikolti fruktojn.

www.infosperber.ch/Artikel/Umwelt/Dank-Aufforstung-praktisch-keine-Sandsturme-mehr-in-Beijing

- -

2019-11/12 filmo pri Konfuceo – la granda china filozofa

La Asocio pri Endangheritaj Etnoj kaj la Tibet-Instituto (en Germanio) produktis filmon pri la uzo de Konfuceo-Institutoj por fortigi la influon de P.R.Chinio.

Bedaurinde en tiuj institutoj on ne rajtas diskutante kritiki la chinan politikon :(- evidente oni timas audi pri la malbona konduto de la registaro.

Same la registaro malrespektas la kulturan autonomion de Tibeto (www.tibet.de/tibet/) kaj de la Ujgura Autonoma Regiono ShingJiango.

Mi ne scias kion dirus Kong Zi pri tia politiko.

La ekonomia povo de Chinio kreskas – bone. Sed samtempe restas la mallibereca konduto kontrau diversaj etnoj kaj religioj.

La plej aktuala estas la klopodo havi plenan kontrolon pri chiuj homoj – ech tiuj en Hongkongo, kie oni proklamis liberecon (promesite ghis 2047 !) pro tio multaj homoj protestas.

Fakte mi kritikis la pli kaj pli perfortan manieron de tiu protesto; ili devintus lerni de la penado de Gandhi atingi liberecon de la britia imperio.

(en la germana) www.gfbv.de/konfuzius

(en la angla kaj china) www.inthenameofconfucius.com/

= =

2019-10-25 Ujguro Ilham Thoti ricevis la „Sahharov-Premion por Homaj Rajtoj“ de la Europa Parlamento.

En Septembro 2019 li ankau ricevis la „Vaclav-Havel Premion por Homaj Rajtoj“ de la Europa Konsilio – al kiu apartenas 47 europaj shtatoj.

Li enghaghighas por la homaj rajtoj de ujguroj en la Autonoma Provinco Sinkiango (en okcidenta P.R. Chinio, chine: XinJiang, antaue: Orienta Turkestanto; chefurbo: Urumqi, chine: wulumuqi).

Li estis kondamnita 2014 al vivlonga mallibereco pro „separatismo“. La prezidento de la EU-Parlamento, Sassoli, diris ke li subtenis la interkomprenighon inter la hana kaj la uigura etnoj. Profesie li estas ekonomisto, kaj instruis ghis 2009 je la universitato de naciaj minoritatoj en Pekino. Li kritikis la politikon de la china registaro setladi han-ĉinojn en tiu autonoma provinco, inter alie ĉar tio akiris la problemon de senlaboreco.

Nuntempe pli ol 1.000.000 da uĝuroj estas internigitaj en ĉinaj kampejoj – oficiale por (re-edukado) lavi iliaj cerbojn; li ankaŭ protestis ke la registaro malhelpis la religian vivon de la islamanoj.

Ni ne forgesu tiajn homojn. Kompreneble P.R. Ĉinio ne shatas tiajn premiigojn. (informoj i.a. el vikipedio)

Retejo en multaj lingvoj de EU – simple shanghu la 2 literojn pri la lingvo:
<http://www.europarl.europa.eu/sakharovprize/EN/home/the-prize.html>

= =

2019-08 EGMR punas Rusion pro mortigo de Magnitski

Sergej Magnitski mortis 2009 en rusa priso, kie li ne ricevis medicinan helpon kaj estis malbone traktita. Li agadis por trovi fraudon de rusiaj instancoj (?) kiuj rezultis en depropriigo de investia mono (pluraj milionoj da usd) de usona investoro Bill Browder. (tute koncize).

La Europa Jugh-kortumo pri Homaj Rajtoj nun punis Rusion kaj postulis pago de (po ?) 34 mil Euro al la patrino kaj al la edzino de Magnitski.

Deataloj en pluraj lingvoj: de.wikipedia.org/wiki/Sergej_Leonidowitsch_Magnitski

Tie vi ankaŭ trovas la ret-ligon al 'Magnitsky Act' – kiu rilatas al ĉiaj shtataj oficistoj kiuj agadas kontraŭ la homaj rajtoj.

= =

2019-07 Israelo ne sekvas la oran regulon

Israelo traktas la palenstinanojn en Gaza kiel malliberuloj – ech malpli bone. Germana iama politikisto Todenhofer estis pafita en la dorson per guma pafajho, ĉar li tenis shieldon – okaze de la vendredaj manifestacioj je la lim-drato:

La teksto sur la shieldo lau Hillel „Kian traktadon vi malamas, tian ne donu al via proksimulo“. Sed okazadas pli severaj pafoj, detruoj de domoj kaj malebligo de normala vivo. Lau germanlingva informejo: <https://bip-jetzt.de/>

Jes, necesus ke ankaŭ Hamas (kaj Irano) akceptu la vivorajton de la shtato Israelo. Sed unue necesus kunsidi je Ronda Tablo kun internaciaj mediatoroj – la diskuto devus komenci surbaze de la UN-Rezolucio de Oslo 1967.

- -

Jen asocio kiu subtenas reiron antaŭ la tempo de Naqba (1948) – konkerado de granda parto de Israelo flanke la judoj kaj forpelo de ĉ. 750.000 palestinanoj, de tiuj ankoraŭ plej granda parto vivas kiel rifughintoj ekster la limoj de Israelo.

Jen la konciza video pri ilia ideo trovi pacon: <https://jewishvoiceforpeace.org/israeli-palestinian-conflict-101/>

Intertempe mi legis detalan artikolon (en la germana) pri la diferenco inter 1948 kaj 1967 (Oslo):

Tute koncize – ekz-e Germanio (la registaro) definis ke estas ne akceptebla postuli reiri al stato antaŭ "1948".

1948 - signifas ke judoj en tiu regiono ighus minoritato (kaj eble estus minacataj), ĉar ĉiuj rifughintaj palestinanoj kune kun siaj familianoj rajtus reveni al siaj loghlokoj en la nuna Israelo.

1967 - signifas la limigon de Israelo al tiamaj limoj, kaj donus pli la spaco kaj politikan liberecon por la Palestinanoj ol nun. La teritorio estas dividita en pluraj sub-areoj kie Israelo havas diversajn

rajtojn. Pri tio oni devus trovi interkonsenton.

Iu juda administranto de KKL (la israela ŝtata fonduso, kiu i.a. rearbarigas la Negev-dezerton) iam klarigis al mi:

Por judoj gravas havi propran landon, ĉar aliloke ili ofte estis mistraktitaj (trafitaj de pogromoj).

Arabaj ŝtatoj entute kovras grandegan teritorion; do palestinanoj povus loghi tie kune kun aliaj araboj.

Sed:

Ghenerala tutmonda problemo estas la bezono limigi la kreskadon de la homaro. En multaj regionoj montrighas limoj de setlado - ekz-e pro limigita kvanto da dolĉa (ne-sala) akvo. Ĉi-cele necesas bona social-politiko, kiu reduktas la devon de familioj havi multajn idojn.

= =

2019-06 Chinio ne respektas la autonomio-kontrakton kun Hongkong (ghis 2047)

Chefministro Lam orientighas je Pekino, kaj tial planis leghon por transdoni ankaŭ civitanojn al P.R.Chinio, se tiu opinias ilin „politike dangheraj“. Grandaj manifestacioj okazis, kiuj postulas la kompletan abolicion de tia legho.

--

2019-06 -18 MH17, Rusio grumblas; Ukraina prezidento vizitas Europon

La rusa registaro klopodis malsubteni la esplorojn de UN pri la BUK-pafo al MH17, pro kio mortis 298 civiluloj en Julio 2014, grandparte el Nederlando. Intertempe la nederlanda ŝtata prokuratoro akuzis 3 rusojn kaj 1 ukrainanon.

--

2019-06 nun vivas 7,7 miliardoj homoj sur nia Tero

Aparte en Afriko kaj Latinameriko vivas pli da multaj junaj homoj, de kiuj oni atendas relative grandan kvanton da infanoj, eĉ se oni supozas ke ili havos malpli da infanoj ol siaj gepatroj. Pro tio la prognozo por 2050 atingas 9,7 miljardojn.

(lau: www.tagesschau.de/inland/weltbevoelkerung-un-101.html)

Komento de AVE/mw:

Jam nun ofte okazas disputoj kaj militoj pro la uzo de tereno. Grandaj konzernoj prenas la plej bonajn agro-terenojn por produkti nutrajhon por la brutaro de la industriaj landoj. Pli kaj pli da pluvbaroj estas detruitaj por planti oleo-palmojn aŭ soj-fabojn. Tiel malaperas la vivo-terenoj por libere vivantaj sovaghaj bestoj. Multaj kamparanoj vivas mizere, ankaŭ pro la agrikultura politiko de EU. Necesas subteni virinojn aktive plani familion.

En Indonezio finfine la islamaj religiaj gvidantoj akceptis tian programon; ili menciis, ke la Korano ne kontraŭas familian planon.

La katolika eklezio – la Papo – skribis en la (ghenerale tre bona) encikliko pri ekologio „Laudato si ..“, ke ne gravas la kvanto da homoj sed la malbona divido de la resursoj. Pri la resursoj li pravus; sed ne eblas senfine pliamasigi la homaron. La sekvo finfine estus terura buĉado kaj malsatmortado de sen-havuloj; kaj antaŭe ekstermo de multaj sovaghaj bestoj kaj plantoj. Bedaurinde en la juda biblio estas la postulo de Dio: „estu fekundaj kaj pli-amasighu!“ Mi esperas ke baldau ankaŭ ili komprenos la bezonon limigi la homaron.

= =

2019-06-01 Internacia tago por abolicio de atombomboj

Pro la denonco de la INF-Kontrakto (por aboli la mez-distancajn atom-rakedojn) flanke de la Usona Trump, finfine nun ankaŭ la rusa prezidento Putin faris la saman. Eĉ se verus ke Rusio jam laboras por novaj mez-distancaj atomarmiloj (Rusio pretendas ke la distanco estas sub 500 km), tiam necesus ke Usono protestas formale kontraŭ tia kashado). Aliaj najbaroj de Rusio (Chinio kaj Hindio/Barato) havas tiajn rakedojn, sed ne partoprenis la INF-Kontrakton. Do, necesus enmeti

ankau tiujn por tia abolicio.

Char Germanio estus en la distanco de tiaj atombombaj rakedoj la germana asocio de milit-rifuzantoj alvokas al manifestacioj en 14 urboj je la 1-a de Junio:

(de, en, ru): <https://inf-vertrag-retten.dfg-vk.de/inf-vertrag-retten-start>

Krome, jen la tutmonda asocio (en): ICANw.org , kiu celas abolicii atomarmilojn entute.

--

2019-05-31 Usono minacas Iranon, Irano k.a. minacas Israelon, Israelo etendighas kontrau-kontrakte.

Anstataŭ protesti en la Sekureco-Konsilio de UN kontraŭ la agado de Irano, kiu (laŭ-vorte kaj neakceptebla) celas neniigi la ŝtaton Israelo, kaj krome estas malamiko de Sauda Arabio, Usona prezidento Trump minacas neniigi Iranon. Jam delonge li akriĝas la ekonomian militon kontraŭ Irano, anstataŭ diskuti je granda Ronda Tablo.

Tie necesas trovi interkonsenton, ke Irano akceptu la ekziston de la ŝtato Israelo – en la limoj laŭ la kontrakto de Oslo (1967) – kaj Hamas (subtenita ĉefe de Irano) finu la militadon kontraŭ Israelo.

Same Israelo devas akcepti ĉi-tiun limigon por finfine trovi pacon kun la palestenaj najbaroj.

Palestena ĵurnalistino R. Owda ĵus desegnis estontan solvon: fini la fendon inter Hamas kaj Fatah, respekti unu komunan potencon/registaron (la palestenan autonomio-administradon en Ramallah); finfine diskuti kun Israelo pri paca solvo. (laŭ: taz.de, 2019-06-1, p. 29)

--

2019-06-04 Ĉiela Paco ankoraŭ tabuo en PR Ĉinio – kiom longe ?

Dum kelksemajnaj protestoj de studentoj kaj poste ankau sindikatistoj por pli libera kaj demokrata sistemo la registaro decidis fini la manifestaciojn kies ĉefa loko estas la Placo de la Ĉiela Paco. Finfine estis mortigitaj pluraj cent civiluloj kaj ankau kelkdek soldatoj, miloj estis vunditaj (ghustaj nombroj ne ekzistas).

Poste la registaro tabuis tiun masakron. Eĉ nun, post 30 jaroj, oni ne rajtas publike diskuti pri ĝi. La patrinoj de la mortigitaj postulas delonge la punon de la respondeculoj, kaj la eblecon publike funebri pri la mortintoj.

Pliaj detaloj pri ambau temoj (parte ankau en Esperanto): wikipedia.org